


MARTO - 1921



HOMARO

Sendependa Broŝuraro

Aperas laŭ Eblo.—Ne-
bqnebla; nur aĉetebla:

Por enlandanoj, unu
specimeno 15 centimoj;
du, 25 centimoj.

Por fremdlandanoj:
2 specimenoj, 1 respon-
dkupono; 100, dek pe-
setoj; du dolaroj; dek
ŝilingoj; dudek kvin
frankoj.

CHIUJ SIN TURNU AL S-RO.

: : J. MANGADA ROSENÖRN : :
JACA (Provinco Huesca) HISPANUJO

A T E N T U

Se iu ajn nacia Societo, Amikaro, aŭ Homiarano
mem, volus milon da samaj broŝuroj, petu informon,
ĉar certe vi ricevos tre akceptindan proponon, tial ke
nur oni celas efektiviĝi la programon kaj oni aspiras
nenian profiton personan.

MARTO - 1921



HOMARO

Sendependa Broŝuraro

Aperas laŭ Eblo. -- Neabonebla:
nur aĉetebla:

Por enlandanoj, unu specimeno,
15 centimoj; du, 25 centimoj.

Por fremdlandanoj: du specimen-
oj, unu respondkupono; 100, dek
pesetoj; du dolaroj; dek ŝilingoj;
dudekkvin frankoj.

Chiuĵ sin turnu al S-ro

: : **J. MANGADA ROSENÖRN** : :
JACA (Provinco Huesca) Hispanujo

Al la Esperantistaro

Kvankam trankvileco ankoraŭ ne regas, la tri fondintoj de la antaŭmilita gazeto "HOMARO" decidis reentrepreni la celon, kiun ĝi aspiris: kaj por tio, anstataŭ la gazeto, aperos laŭ eblo Broŝuraro "HOMARO". Ni, per la broŝuroj laborados por alporti ion al celo de tutmonda interfratiĝo, de tute sendependa loko. Ne estos abonoj, kaj se kosto permesus, ni malaltigus la prezojn de la broŝuroj je minimumo.

Tial ke ni neniom fidus je la Nuna Ligo de Nacioj, kaj opiniante, ke la Homaro bezonas malaperigi por ĉiam la militon, neniam tekstoj pli konvenaj, ol represado de "Deklaracio pri Homaranismo" de nia kara Majstro, kaj elĉerpitaĵo de verko de H. E. Hyde, novzelandano; ĉar ni opinias, ke la "Deklaracio" kaj la propono de la novzelandano kompletas unu la alian kaj formas firman bazon por starigi veran kaj efikan Ligon de Nacioj. Kaj ĉi tiu Ligo, akceptante Esperanton, kiel oficialan lingvon, devigos la ŝtatojn oficialigi devigi instruadon de Esperanto en la naciaj lernejoj.

2811

Republiko de Hispanio - Federacio
Calle de San Pedro 11 - 37 - 7 - 28013 MADRID
Tel. 434 - (9) - 4483079

Ni esperas, ke Esperantistoj plezure akceptos la laboron de tiuj ĉi tri Homaranoj, kiuj salutas ilin tute frate.

Emilio G. Linera (Presisto)

Ferdinando Redondo (Staba Majoro)

Julio Mangada Rosenörn (Infanteria Majoro)

HOMARANISMO

De D^{ro} L. L. ZAMENHOF

Varsovio (Pollando) Ruslando

ANTAŬPAROLO

La ĉi tie donata Deklaracio prezentas mian politika-religian kredon.

Ĉar oni konas min kiel aŭtoron de Esperanto, tial multaj personoj eble identigos la Homaranismon kun Esperanto aŭ kun la tiel nomata "interna ideo de la Esperantismo"; tio tamen estus eraro. Dum la esenco de Esperanto estas plena neŭtraleco kaj la esperantisma ideo prezentas nur nedifinitan fratecan senton kaj esperon, kiujn nature naskas la renkontiĝado sur neŭtrala lingva fundamento kaj kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel, kiel li volas, sed eĉ generale akcepti aŭ ne akcepti ilin—la Homaranismo estas speciala kaj tute difinita politika-religia programo, kiu prezentas mian kredon pure privatan kaj la aliajn esperantistojn tute ne koncernas.

Mi antaŭvidas tre bone, ke la malamikoj de Esperanto uzos mian deklaracion pri Homaranismo kiel batalilon kontraŭ Esperanto, kaj mian pure personan principaron ili prezentos al la mondo kiel devigan principaron de ĉiuj esperantistoj. Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi dum tre longa tempo havis la intencan aŭ tute ne publikigi mian kredon, aŭ publikigi ĝin anonime. Sed mi forjetis tiun intencan, ĉar mi trovis, ke tio estus nepardoninda senkuraĝeco. Tamen, por tute liberigi la esperantistojn de ĉia suspekta solidareco kun miaj pri-

16x000064/00281144

vataj politikaj kaj religiaj konvinkoj, mi dum la oka universala kongreso de Esperanto publike formetis de mi ĉian oficialan rolon en la aferoj de Esperanto.

Ne por la celo de propagando mi publikigas nun mian kredon; mi simple deziras, ke miaj amikoj konu mian kredon, por ke ilin ne mirigu mia rilato al tiu aŭ alia politika aŭ religia demando kaj por ke la personoj, kiuj havas la samajn principojn kiel mi, sciŭ, ke ni estas samprincipanoj.

L. L. Zamenhof

Varsovio, Majo 1913.



Deklaracio pri Homaranismo

Mi estas Homarano; tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

I

Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

II

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona volo kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

IV

III

Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene elgarajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; la indentigadon de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstadon de iaĵ historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, mi rigardas kiel restaĵon el la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

IV

Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova mondo, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. Ĝhis la tempo, kiam tiuj landoj ricevos nomojn neŭtralajn, mi devas almenaŭ en interparolado kun miaj samprincipanoj nomi tiujn landojn laŭ iliaj ĉefurboj kun aldono de la vortoj “regno”, “provinco”, k. t. p.

V

Mi konscias, ke en sia privata vivo ĉiu homo havas plenan kaj nedisputeblan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiu estas al li plej agrabla, kaj konfesi tiun religion, kiu plej multe lin kontentigas, sed en komuniĝado kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas peni uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neŭtrala povas havi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj, sed ke tio devas esti rigardata nur kiel prooportunece cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne kiel ia humiliga tributo, kiu ŝuldas gentoj mastrataj al gentoj mastrantaj. Mi konscias, ke en tiaj lokoj, kie batalas inter si diversaj gentoj, estas dezirinde, ke en la publikaj institucioj estu uzata lingvo neŭtrala homa, aŭ ke almenaŭ krom la gentlingvaj kulturejoj tie ekzistu ankaŭ specialaj lernejoj kaj kulturaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa, por ke ĉiuj dezirantoj povu ĉerpi kulturon kaj eduki siajn infanojn en senŝovinisma spirito neŭtrale-homa.

VI

Ĉar mi konscias, ke la reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkutimiĝos starigi la nomon “homo” pli alte, ol la nomon de gento, kaj ĉar la tro nepreciza vorto “popolo” ofte donas kaŭzon al genta ŝovinismo, disputoj kaj malbonuzoj kaj ofte malame dividas inter si la filojn de la sama lando aŭ eĉ de la sama gento, tial je la demando, al kiu popolo mi alkalkulas min, mi respondas: mi estas Homarano: nur tiam, kiam oni demandas min speciale pri mia regno, provinco, lingvo, deveno aŭ religio, mi donas pri tio precizajn respondojn.

VII

Mia patrolando mi nomas tiun landon, en kiu mi naskiĝis; mia hejmolando mi nomas tiun landon, en kiu mi estas konstanta, fikshejma loĝanto. Sed ĉar pro la nedifiniteco de la vorto "lando" la vortoj "patrolando" kaj "hejmolando" estas tre neprecizaj kaj ofte kaŭzas disputojn kaj malpacon kaj malamike disigas inter si la filojn de la sama terpeco, tial en ĉiuj dubaj okazoj mi evitas tiujn neprecizajn vortojn kaj uzas anstataŭ ili la pli precizajn vortojn "patruja regno", "patruja regiono", "patruja urbo", "hejma regno", "hejma regiono", "hejma urbo".

VIII

Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ sociaĵon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paraliziti tiun tute naturan senton. Tial se en mia hejmo ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneco aŭ gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian entuziasmon por socia laborado aŭ eĉ devigas min revii pri alia hejmolando, mi ne devas mal-esperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejmo pli aŭ malpli frue pasos kaj miaj filoj aŭ nepoj plene ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj.

IX

Konsciante, ke lingvo devas esti por la homo ne celo, sed nur rimedo, ne disigilo, sed unuigilo kaj ke la lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter la homoj, mi neniam gentan lingvon aŭ dialekton devas rigardi kiel mian sanktaĵon, kiel ajn mi ĝin amas, nek fari el ĝi mian batalan standardon. Kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo gepatra, mi nomas senŝovinisme tiun lingvon aŭ dialekton, en kiu mi en mia infaneco parolis kun miaj gepatroj; kiam oni min demandas speciale pri mia lingvo persona, mi—kvidante min per neniaj ŝovinismaj konsideroj— nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone posedas aŭ plej volonte uzas; sed

kia ajn estas mia lingvo gepatra aŭ persona, mi devas posedi ankaŭ tiun neŭtrale-homan lingvon, kiun miaj samtempuloj uzas por rilatoj intergentaj, por ke mi ne bezonu miakulpe altrudi al aliuloj mian lingvon kaj por ke mi havu moralan rajton deziri, ke aliuloj ne altrudu al mi sian, kaj por ke mi povu sur senŝovinisma bazo servi al la kulturo neŭtrale-homa.

X

Konsciante, ke religio devas esti nur afero de sincera kredo, sed ne ludi la rolon de hereda genta disigilo, mi nomas mia religio nur tiun religion aŭ religianstataŭntan sistemon, je kiu mi efektive kredas. Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la neŭtrale-homaj pincipoj “homaranaj”, kiuj konsistas en jeno:

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo “Dio” aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami moki aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco kaj ke la ĉefa, por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado, aŭ neplenumado dependas de nia volo.

c) Se mi kredas je neniu el la ekzistantaj revelaciaj religioj, mi ne devas resti en iu el ili sole pro motivoj gentaj kaj per mia restado erarigi la homojn pri miaj konvinkoj kaj herede nutri per senfinaj generacioj intergentan disecon, sed mi devas—se la leĝoj de mia lando tion permesas—malkaŝe kaj oficiale nomi min “liberkreda”, ne identigante tamen la liberkredon speciale kun ateismo, sed rezervante al mia kredado plenan liberecon. Kiam en mia loĝloko ekzistas komuninterkonsente aranĝita, plenforme organizita sengenta kaj sendoktrina komunumo de liberkredanoj, al kiu mi povos aliĝi

kun plena kontenteco por mia konscienco kaj por la bezonoj de mia koro, tiam—por fiksi fortike kaj precize mian religian neŭtralecon kaj savi mian posteularon kontraŭ senprogrameco kaj konsekvence kontraŭ refalo en gente-religian ŝovinismon—mi devas aliĝi al tiu libercreda komunumo tute oficiale kaj heredigebla kaj akcepti por mi ĝian neŭtralan nomon, ĝiajn komunumajn aranĝojn, ĝiajn nedevigajn neŭtrale-homajn festojn kaj morojn, ĝian neŭtrale-homan kalendaron k. t. p.; ĝis tiu tempo mi povas resti oficiale alskribita al tiu religio, en kiu mi naskiĝis, sed mi devas ĉiam aldoni al ĝia nomo la vorton “libercreda”, por montri, ke mi alkalkulas min al ĝi nur provizore, laŭmore kaj administre.



Chi tiu politika-religia programo estas firma kaj efika rimedo por fari evitebla la militon, se oni kompletus ĝin per la propono de la novzelandano H. E. Hyde pri Internacia Regado, kiu supozas Federigon de la ŝtatoj. La propono de H. E. Hyde starigas:

I.^o Internacian Parlamenton, kiu konsistos el reprezentantoj el ĉiu nacio:

II.^o Tribunalon, kiun prezidos juĝistaro nomita kaj elektita de tiu Parlamento; kaj tial ke, laŭ diris S-ro. *Balfour*, je Majo de 1916 “La juro ne sufiĉas, malantaŭ la juro devas stari la Forio”, la novzelandano starigas III.^o : Internaciajn militistaron kaj mararmeon, kiuj estos sufiĉe fortaj por efektiviĝi la decidojn de la Tribunalo.

La Internacia Parlamento farus leĝojn, kiuj nur rilatos al aferoj internaciaj, kaj neniel tuŝos la agadkampon ekskluzivian de la naciaj Parlamentoj, escepte kiam laboro de nacia Parlamento rilatus la pacon de la mondo.

“La Internacia Parlamento devus konsisti el naciaj reprezentantoj el ĉiu politika partio, elektitaj de la Parlamentoj de la aliĝintaj ŝtatoj. Por ke Internacia Regado restu sur demokratiaj principoj, estas nepre necese, ke ĝi efektive reprezentu la popolojn. La Kandidato por tiu alta ofico devus posedi internacian spiriton, tio estas, li devus kredi, ke la celo de la homaro estas kunlaboro, justeco, kaj harmonio inter viro kaj virino, inter ŝtatoj kaj inter ĉiuj rasoj. Tiaj personoj estas trov-

eblaj en ĉiu nacio.” La debatoj estus publikaj kaj eldonitaj esperante.

La Internacia Tribunalo administrus la Internacian Juron, kaj viglus kontrolon de la Internacia Armeo ĉiuspeca. Certe ĉi tiu dua funkcio estus por Agada Konsilantaro elektita de la Parlamento, kaj konsilata de Ĝenerala Stabo de generaloj kaj admiraloj.

La Internacia Tribunalo traktus nur aferojn de rilatoj interŝtataj; ĝi administrus la leĝojn faritajn de la Internacia Parlamento. Ĉiu ŝtato el la Internacia Federigo metus ĉiajn siajn disputojn kun alia aŭ aliaj ŝtatoj antaŭ la Tribunalon, kaj neniel solvus ilin perforte. Decido de la Tribunalo estus neapelaciebla kaj la Internacia Armeo obeigus la decidon se estus necese.

La Internacia Parlamento elektus la Juĝistojn, kiujn subtenus la plena povo de la Internacia Registaro, se okaze iu ŝtato el la Federigo volus disputi per la milita forto decidon de la Juĝistaro. La Parlamento rajtus eksigi juĝiston laŭ voĉdono de la plimulto.

Kiam ŝtato ne apartenanta al Federigo havis disputon kun federacia ŝtato, ĉi tiu rajtus (mi opinias ke nepre devus esti devo) meti la aferon sub la Tribunalo, kies decidon obeigus la Internacia Registaro. Sed ĉiam la Juĝistoj rajtus obeigi la decidon per ĉiaj bojkotoj kontraŭ la malobeanta ŝtato, antaŭ ol uzi la Internacian Militaron.

La Internacia Militistaro devus esti tiel potenca, ke neniu koalicio de ŝtatoj povus ĝin venki. Ĝi devus konsisti el elektitoj el ĉiu federacia ŝtato, kiuj posedus forte enradikigitan amon al tutmonda interfratigo, kaj kiuj ĵurus fidelecon al la Internacia Registaro. Certe eĉ la pacemuloj opinius esti honoro aparteni al la Internacia Militistaro por konservi la pacon de la mondo. Aŭtokrato, rasa malamo, kapitalismo, k. e., estus nepovaj eksplodigi militon.

La Internacia Parlamento kontrolus fabrikadon de militiloj, armiloj kaj municioj, en la tuta mondo, kaj devus havi ankaŭ la povon malpermesi fabriki ĉion, kio povus minaci la pacon, ĉiam limigante la fabrikadon al nacioj kaj malpermesante ĝin al privatulo. (Petu broŝuron al The British Esperanto Association-17 Hart Street-London, W. C. I. Prezo; 8 Sd.)

Bazo firma por la Internacia Militistaro estus la internacia organizaĵo de ekssoldatoj de la ĵus pasinta milito.

Okaze de la Unua Diskuta Kunveno de la Esperantistoj de Iberaj Landoj de la 26.^a ĝis la 30.^a de la pasinta Majo en Barcelono, mi prezentis temon, kiu koncernas akcepton de la "Deklaracio" kiel kodon kaj la proponon de H. E. Hyde, kaj faris paroladon dum kunveno, kaj la ĉeestantaro unuanime akceptis mian proponon: sed la akcepto ne sufiĉas kontentigi min, kvankam multe mi ĝojis pro la unuanimeco, kaj tial ke "la movon oni pravas per marŝado", kaj tial ke, laŭ antikva proverbo, "al Dio preĝante kaj samtempe per martelo batante", mi ne plu atendas, kaj mi min ĵetas en la vojon montritan: mi flagrigas la standardon de "Homaranismo" kaj atentigas tiujn, kiuj aŭskultis min kaj akceptis unuanime mian proponon, por starigi grandan kaj aktivan rondon familian per tiom da nuntempaj rondetoj celantaj samon, sed dividitaj nur de la koloro de la vitraĵo tra kiu ili vidas la saman celon. (1)

Mi scias, ke en Svisujo, jam post la IX.^a Universala Kongreso en Berno, ekagadis por organizi Homaranismon, sed la milito venis, la milito disvolvigadis, ŝajnis finiĝi; sed surde persistadas vera malpaco, kiu eble post nelonge nin militigos denove, tial ke nuna Ligo de Nacioj estas neutila, neefika por starigi firme la pacon; pro ĉio ĉi tio, mi min turnas unuavice al tiuj, kiuj unuanime akceptis mian proponon, ariĝi por formi la bazon al realismo pri tiu *Granda Rondo Familia* korsentata de la nuntempa Moseo. de nia karega Majstro, kaj por kiu li eĉ oferis sian vivon. Ni estu indaj disciploj liaj! Ni tuj ariĝu!

Julio Mangada Rosenörn

Alvoko

Unuigu en la urboj, en la regionoj, en la nacioj; nomu urban aŭ urbajn reprezentantojn; sciigu nomojn kaj adresojn por aperigo en kiel eble plej tuja broŝuro, por ankaŭ kiel eble plej baldaŭa interrilatiĝo kaj organizado: subskribu la

(1) Oni akceptos mallongajn originalojn, kiuj celos efektivi la programon, aŭ pritraktos homaman temon.

jenan dokumenton kaj deziriinde kolektu ilin reprezentanto aŭ reprezentantoj ĝis okazo, kiam oni starigos la nacian sekcion de Homaranoj kaj difinos naciajn komitatojn al kiuj devas iri la subskribitaj dokumentoj.

DOKUMENTO:

Mi aprobas la "Deklaracio pri Homaranismo" de la Majs-tro, kiel Konstitucion, por organizi tutmondan anaron star-igontan Internaciajn Parlamenton, Tribunalon kaj Militistar-on, kiuj subtenos nepre, spite ĉio, tutmondan pacon konst-antan.

1. Mia nomo familia estas:
2. Mia nomo persona estas:
3. Mi naskiĝis en la jaro:
4. Laŭ mia profesio mi estas:
5. Mia patrujo estas: a) Regno:
- b) regiono:
- c) urbo aŭ vilaĝo:
6. Mia hejmo estas: a) regno:
- b) regiono:
- c) urbo aŭ vilaĝo:
- d) strato kaj domo:
7. La gento de mia supozata deveno estas:
8. Mia lingvo gepatra estas:
9. Mia lingvo persona estas:
10. Mia religio estas:
- (1)

(1) Subskribo kaj parafo. Faru dokumenton saman tute klare.

PROFILOJ DE LA JHUS PASINTA MILITO

La Tragedio de Francisko Jozefo

La ĵurnalaro diras: “.....kaj el la palaco eliris grafo Berchtold, informinte pri la lastaj okazintaĵoj de la milio sian imperiestran moŝton; tiam la imperiestro sin enfermis en siaj apartaj ĉambroj, kaj surgenuiĝante kontraŭ bildo de la krucumito, li preĝis.....”

Kaj li preĝis horon post horo. Kaj li, tenante sian blankan kapon inter la manoj, kun lacaj, plenfarmaj okuloj fiksitaĵ kontraŭ la vizaĝo de la Savinto, tremante, paroletis preĝon, kiun li jam ofte balbutis en multaj maldolĉaj okazintaĵoj:

“Kompatu, Patro mia, tiun, kiu suferis ĉiajn dolorojn!...”

Kaj Kristo, kronita per dornoj, ŝajnis rigardi komplete la malfeliĉan okdekjarulon, kies tempiojn ankaŭ premas turmentanta duobla ora krono, kaj kiu, kiel Li, trinkas galajon, kaj kiun, kiel Lin, eble vundis la farizeoj.

□ □ □

Kaj tie, la faciĝo venkis la duregnan monarĥon, sur la preĝbenko.

Kaj liaj palpebroj sin fermis.....

□ □ □

1848!.....

La ĉefepiskopa palaco de Osmütz estas suno, kiu mirigas. La kortego, la ambasadoroj, la nobelaro, ĉiuj sin amasigas ĉirkaŭ la ruĝa estrado. Francisko Jozefo aŭdas la voĉon de princeo Schwarzenberg proklamanta lin Imperiestro, kaj lin korusas la huraoj de la popolamaso. Li surgenuiĝis antaŭ sia onklo Ferdinando, kiu donas al li sian sceptron kaj benas lin. Li manpremis la manon de princo de Windschgraetz, ĉefgeneral-o de la armeo batalanta kontraŭ la hungaraj ribelantoj. Lin ĉevalo atendas.

Li gracie, konforme je siaj dekok jaroj, rajdas antaŭ la korpuso, kiuj honorsalutas lin. Ili estas la maljunaj soldatoj, kiuj defendas lian tronon kontraŭ la italaj kaj hungaraj revol-

ucianoj; tiuj, kiuj esperas de lia juneco la pacon de la regnoj. Kaj li parolas al ili ridetigante kontente siajn maljunajn generalojn.

Kaj, pli malfrue, akceptante la deputitaron de Kremsier, kiu humile alproksimiĝis al li por peti de li Konstitucion, li faris geston kaj diris kolerajn vortojn: "Mi ne estas Konstitucia Imperiestro!; mi estas Imperiestro dank' al Dia Graco..."

Kaj li komencas regi.....



Ho, la nevenkeblaj Hungaroj!

La Imperio riskas sian sorton pro la obstineco de ilia generalo Georgei, kiu venkis unu post la alia ĉiujn aŭstriajn generalojn; kaj la ribelado flugas de unu al alia limo de ambaŭ landoj.....

Se la Rusoj estus helpemaj!.....

Kaj Francisko Jozefo redaktas nerveme helpopetan leteron por la Caro. Kaj la Caro, kompatante la junan monarĥon, helpas lin.

Bravaj estas la kozakoj! Kiaj heroaĵoj, tiaj de la siberiaj korpuso! Kia kuraĝo, tia de la timinda Paskiewicz! La kontraŭstaro de la Hungaroj estas vana.

La Krono de Hungarujo firmiĝas sur kapo de la junulo...

Kial se li deziras feliĉon al tiu popolo, post la farita paco, la hungara *Libeny* atencis lin?



La preĝejo de la Kastelo de Ischl estas plena je kredantoj. Jen la Imperiestro kaj jen ankaŭ la granda duko Maksimiliano de Bavarujo kun siaj du filinoj, Sofio kaj Elizabeto, ili ĉeestas meson. Ĉe la momento mem, kiam la pastro sin pretigis beni la ĉeestantojn, Francisko Jozefo starigas, prenas la manon de Elizabeto kaj sin direktas kun ŝi al la pastro, dirante: "Benu nin, pratro; jen mia edzino!"

Kaj ŝi, pala kiel mortintino, bela kiel virgulino, rememoris la profetaĵon de ciganino: "Imperia kaj martira kronoj zonos vian frunton....."

Sed ŝi amis lin, kaj tial ŝi akceptis ambaŭ kronojn.....

La ponarde de Lucheni en Genevo traboris la koron de Elizabeto de Bavarujo; li estis indulga, volinte esti kruela.....



Militoj! Ĉiam militoj!
Montebello, Magenta, Solferino, Sadova!.....
De la 59.^a jaro ĝis la 67.^a, senĉesa milito! Kontraŭ Prusuj-
o, kontraŭ Italujo, kontraŭ Francujo.....
En ĉiuj landlimoj, sango!



Sango! Sango ĉie!
Tra ĉie tragedia vidaĵo persekutis Franciskon Jozefon.
La bonamatan Maksimilianon mortpafas la Meksikanoj.
Rudolfo, la heredonto, la sola filo, la sola espero, kune
kun sia amatino, la baronino de Veĉera, aperas mortpafitaj
en la Kastelo de Mayerling.

La granda duko, Johano Salvador, mistere malaperis en
la sudpolusa maro. La granda duko, Ladislao, mortis pro ĉas-
akcidento.

Mortigita la Imperiestrino. Mortigitaj Francisko Ferdi-
nando kaj lia edzino, la grafino de Chotek.....

La mano, jam maljuna, kaj la okuloj, jam malhelaj, de
Francisko Jozefo, malfacile redaktas manifestojn por la popol-
oj: "Profunde kortuŝita pro la malfeliĉo, kiun mi ĵus suferis,
mi submetiĝas al la neesploreblaj destinoj de Dio, kaj mi pet-
as Lin, ke Li donu al mi fortojn, por ke mi kuragiĝu kaj ple-
numu miajn reĝajn devojn, kiujn mi obstine plenumos fidele
je la ĝenerala bono kaj konservado de la paco."

Kaj plorante, li kliniĝas antaŭ la altaro por diri sian preĝ-
on: "Kompatu min, mia Patro! Kompatu tiun, kiu suferis
ĉiam dolorojn!....."



...Tium, kiu suferis ĉiajn dolorojn!.....
Hornung, la maljuna kaj intima servisto de la Imperiestr-
ino, trovis lin surgenuiĝinta kontraŭ bildo de Kristo, je la tagiĝo,
— Via imperiestra moŝto!.....

La imperiestro levis la blankan kapon.

Via imperiestra moŝto, permesu, ke mi vin admonu.....

Mi preĝis, Hornung.

Via imperiestra moŝto dormis. Nek Dio, nek vi, profitos
tian oferon.



Hornung, Hornung!..... Kial vi vekis min antaŭ tiu malindulga tagiĝo?.....

Hispane verkita de *Leopoldo Bejarano*

Tradukita de *Mangada Rosenorn*

IUJ PENSOJ

(EL "CIVITANOJ DE LA MONDO")

"Mi ne apartenas al iu lando: mi estas Civitano de la Mondo."—Esopó.

"La perfidulo al la Homaro, estas la plej malbenita el ĉiuj perfiduloj. La Homaro estas super ĉiuj Konstitucioj. Estas pli bone putriĝi en la tero, ol esti fidela al Esklezio kaj Ŝtato, dum oni estas duoble fatsa al Dio."—J. Russell Lowell.

"La spirito de bigoteco, kiu limigas sian amon al iu sekto, kaj la spirito de aristokrateco, kiu konsideras la popolomason, kiel malsuperan rason, estas egale riproĉitaj de Kristanismo, kiu antaŭ mil okcent jaroj, en netolerema kaj superstiĉa epoko instruis tion, kion la nuna epoko ekkomprenas, ke ĉiuj homoj estas esence egalaj, kaj ke ĉiuj devas esti honorataj, ĉar ili estas kreitaj por senmorteco, kaj dotitaj kun kapabloj por senfina plibonigado."—Channing.

"Ofte la spirito de grandaj okazoj anoncas sin antaŭ la okazoj, kaj en hodiaŭo jam marŝas morgaŭo."—S. T. Coleridge.

"Tute ne kredante, ke malestimo de la pasinteco estas kondiĉo de Progreso, mi serĉas en tiu direkto la vojojn al Estonteco."—Yervant H. Iskender.

"La vera civilizeco de la mondo malaperas, kiam la moraleco vaporigas per ceremonioj, kaj la devotaj oportunaĵoj."—Yervant H. Iskender.


“Homoj suferas kaj falas kune; sed, kiel en la mateno post batalo, la postvivantoj marŝas triumfe, preskaŭ ne pensante pri la falintoj, tiel la popolamasoj, perdintaj kamaradojn sed maltimaj, sekvas la vojon laŭ kiu la Providenco direktis ilin.”—Yervant H. Iskender.

“La vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas”.— L. L. Zamenhof.

ANTAŬPAROLO DE “CIVITANOJ DE LA MONDO”

En 1898, mi vojaĝis tra Malgranda Azio kaj akompanis min gvardio konsistanta el kvar viroj. Ni ĉiuj vojaĝis rajde. Unu vesperon, ni atingis la vilaĝeton Eski Ĉeir en la Vilajeto Konia, lacaĵ kaj konsumitaj pro longa tuttaga rajdado. Nia ĉagreno estis granda, kiam ni konstatis, ke en la vilaĝo ne estas gastejo. Post esplorado, mi sciigis, ke Ali Agha, la Ĉefo kaj plej riĉa homo de la vilaĝeto, konsentis gastigi nin kaj provizi por miaj bezonoj. Ni trovis, ke li estas sepdekjarulo, malgrasa kaj altkreska, portanta blankan longan barbon malmultaharan pro aĝo. Li kore bonvenigis nin kaj malavare gastigis nin dum kvin tagoj. Riĉa li sendube estis laŭ la vidpunkto de la enloĝantoj de Eski Ĉeir, sed vere malriĉa laŭ la mezuro de Eŭropanoj. Lia riĉaĵo konsistis el kelkaj bovinoj, kelkaj kortbirdoj, kaj du-tri ĉevaloj. Kiam la tempo venis por adiaŭo, mi petis al Ali Agha kalkulon. Li tute rifuzis pagon, kaj kiam mi provis devigi lin akcepti donacon, li egale firme rifuzis. Mi neniam forgesos la parolojn, kiun li, Mahometano, eldiris al mi, Kristano, kiam li fine rifuzis mian proponitan rekompencan. Gentile tuŝante min sur la ŝultro kaj levante siajn okulojn, li diris: “Junulo, ni ĉiuj apartenas al unu familio, kaj mi dankas al Dio, ke estas permesite al mi vivadi por koni ankoraŭ unu al miaj fratoj, antaŭ ol mi mortos.”

Yervant H. Iskender



Pri Cervantes kaj lia famkonata verko

EL QUIJOTE

Entenas: Antaŭparolo de T. Soriano.-- **Biografia skizo**, kiun verkis boheme A. Pikhart, kaj tradukita esperante de Ed. Kühnl.--**Cervantes kaj Don Quijote**, de V. Inglada.--**La Ora Epoko** de Ricardo Codorniu.--**Cervantes** de E. Barriobero Herran.-- **La Plumo kaj la Spado** de F. Redondo.-- **Kiu estas Don Quijote** de J. Mangada Rosenörn.--**Cervantes Kavaliro de la Idealo** de J. Grau Casas.--**La Glora Cervantes** de S-ro Rafael de San Millan, kaj **Batalrajda Kristo** traduko esperanta de Vicente Inglada.

Mendu la libreton kaj sendu kvar respondkuponojn.

Ĉiu Esperantisto devos posedi ĉi tiun libreton.

Se vi volus ricevi gazeton kun tre interesa teksto kaj belaj ilustraĵoj pri rimarkindaj artaj kaj naturaj belajaĵoj, kaj samtempe ricevi librojn de tempo al tempo, preskaŭ senpage, abonu "Hispana Esperantisto" Adreso: J. Mangada Rosenörn. — **JACA** (Provinco Huesca)—Eŝpana. Jarabono: SES pesetoj por fremdlandanoj; KVAR por samlandanoj.

Grupoj ricegos siajn bibliotekojn aĉetante la kolektojn de la jaroj 1917-18-19-20, kiuj formas du volumojn kun multenombraj ilustraĵoj pri la rimarkindaj arkitekturaĵoj de **Sevilla, Burgos, Segovia, Avila**, k. c. La kvar kolektoj kostas dudek kvin pesetojn (kvar dolarojn, dudek ŝilingojn, kvindek frankojn).

Pro deziro favori Esperantistojn de Orienta kaj Centra Eŭropo, ĉi tiuj povos aboni la gazeton sendante al S-ro. F. Shilha, strato U. Karlova, 460.—Prah—Ĉeĥoslovakio-45 kronojn ĉeĥoslovakajn.

Baldaŭ aperos "Ferdinando VI.^a kaj Farinelli", historia novelo proze kaj verse verkita de J. Mangada Rosenörn, kiun ricevos enlandaj kaj fremdaj abonantoj, kiuj estos sendintaj 25 centiman poŝtmarkon kaj unu respondkuponon respektive.